**EKO**

**Esperiga Komuniko**

**Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado**

## Enhavo


- Universitata registrado
- Rezultoj de VEKI venadas
- Grezljono invitas oktobre
- Esperanto en fervoja leksikono



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-46 sendita el Budapeŝto, la 19an de septembro*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA


# Ni konu niajn universitatojn!

Jam de longa tempo nun funkcias, ĉe www..edukado.net, la eblo registri universitatajn kursojn pri Esperanto aŭ interlingvistiko. Nia ĉefa celo estas multigi tiajn kursojn tra la mondo. Ili levas la prestiĝon de Esperanto kaj instigas homojn lerni la lingvon. Pro tio,  bonvolu iri al la paĝo

https://edukado.net/kursejo

kaj registri vian kurson. En tiu paĝaro, se vi iras al la fundo de la paĝo kaj premas la vorton 'statistiko', vi trovas bildajn statistikojn pri la registritaj kursoj.

Se vi mem gvidas tian kurson, registru ĝin por kuraĝigi aliajn kolegojn sekvi vian ekzemplon. Se vi scias, ke tia kurso okazas en via lando, sed ne povas kontakti la instruiston, informu nin ĉe <esperanto.en.universitatoj@gmail.com>.

<edukado.net> estas partnero de ILEI kaj UEA, kiuj plene apogas ĝian laboron.



Sceno el surloka kunsido en la universitataj kursoj de Pollando en 2017.

# VEKI restas veka kaj registras siajn atingojn

VEKI estas la admirinda virtuala formo de la ĉi-jara Kongreso de ILEI. Ĉiutage venas plia filmo, filmeto, programero de VEKI. IRU AL la youtube-kanalo de ILEI

Esperanto+Edukado ILEI https://www.youtube.com/c/EsperantoEdukadoILEI/

Ĉar VEKI daŭris 7 tagojn, ĉar ĉiu tago enhavis 12 horojn da elsendado, temas pri proksimume 80 programeroj. Jam nun aperas la unuaj, kaj la plu sendado daŭros ĝis la 15-a de novembro. Do iru al la paĝo kaj abonu ĝin.

Tiu paĝo entenas ankaŭ novaĵojn pri ILEI kaj filmojn pri pedagogio kaj lingvolernado. Do ne malhavebla ilo por vi !

Mireille Grosjean

# Ondo donas al ni ondojn

Ekde januaro ĝis la 6a de septembro 2020 dum 250 tagoj en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉiutage aperis almenaŭ unu nova teksto. Legu prian artikolon kun listo de la plej popularaj tekstoj ĉe https://sezonoj.ru/2020/09/ondo-67/

# Riĉa aŭtuna propono de Greziljono

La programoj okazos ekde la 21a de oktobro. Ni laboras por realigi AMOn 68 kadre de tiu programaro – kaj surloke kaj perrete.



Sceno el AMO 33 okazinta en la Kulturcentro en arilo 2017 pri instruado.

- Eo-KURSOJ
    - Tim Morley (Britio): « Paroligo kaj Polurigo » (B2-C1)
      Maja Mériaux aŭ Laurent Peuch: Kurso por progresantoj (A2-B1)
      Xavier Godivier: Kurso por komencantoj (A1-A2)
- POR INFANOJ KAJ ADOLESKULOJ
    - Elisabeth Barbay: Praktikado de Esperanto per ludoj
    - Elisabeth Barbay: Ĉirkaŭ la temo Haloveno : ornamado de la salono, kostumoj, rakontoj, kantoj

   - Sportaj aktivecoj: Kajaki, arbogrimpi, naĝejo, *Boule de fort*, (perverse malica kaj tamen insiga kaj fascina  subtegmenta formo de la pli konata sporto kun buloj kaj kegloj - SMG), tabloteniso, petanko

- AKTIVAĴOJ
   - Laurent Peuch: **Teatra** ateliero
   - Nathalie Rigault: *LandArt*, Arto kaj Naturo en Greziljono
   - Xavier Godivier: Meditado-seancoj
- VESPEROJ
   - Ĵak O'Lantern' (Irlando) Folklora Halovena festo, post nia vizito ĉe najbaroj je *2020-10-31*
   - Fotoprelegoj, filmoj, mutaj filmoj
   - Ludoj por ĉiuj: societaj tabloludoj, skrablo

## La Internacia Fervoja Unio (UIC) uzas Esperanton

UIC  (*Union Internationale des Chemins de Fer*) prizorgas la terminologian projekton *RailLexic.* Ĝia reta vizaĝo *RailLexic Online* havas novan aspekton. La UIC-Terminologia Grupo ekipis RailLexic Online (RLO) per moderna interfaco celante pli bone servi al la UIC-membroj kaj la sektoro fervoj-ekonomia. La ĉefa misio estis konsiderinde plibonigi la praktikan aliron flanke de la uzantoj, redaktantoj kaj kontribuantoj. La fervojista vortaro de UIC: la unua-ranga leksikono RailLexic Online ofertas pli ol 11.000 fervojajn nociojn, prezentitajn en 23 lingvoj, inter kiuj Esperanto.

La pliaj lingvoj subtenataj estas la angla, araba, ĉeĥa, dana, finna, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, sveda kaj turka.

Nia propra faka asocio IFEF de jaroj havas aktivan terminologian sekcion, kiu produktis mem plurajn kelklingvajn fervojistajn terminarojn.

======= Vortoj: 560 ======

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.